

EKO 2024

TRA LA
MONDO
IRAS FORTA
VOKO

Numero 2024: 43; decembro 15.

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: KB. Sume 390 KB

Nepala kurso en Kolegio

La Departemento pri Kampara Disvolviĝo organizis 20-horan ne-kredithoran kurson pri Esperanto. Ĉi tiu projekto estas oficiale subtenata de Kotesar Multfaka Kolegio.

En la solena inaŭguro de la kurso. S-ro Manoj Adhikari, la ĉefo de la departemento, bonvenigis la ĉeestantojn. Kiel la ĉefa gasto de la evento, S-ro Govinda Bahadur Karki, la ĉefo de la kolegio, parolis pri la graveco de Esperanto kiel neŭtrala internacia lingvo kaj pri ĝia historio. Prof. d-ro Bharat Kumar Upadhaya, sekretario de Nepala Esperanto-Asocio, prezentis inspirplenan prelegon pri Zamenhof, kuraĝigante la studentojn pli profunde esplori la lingvon.

La instruisto Bharat Kumar Ghimire klarigis la bazojn de la lingvo kaj respondis demandojn. La programo estis gvidata de s-ro Padam Raj Joshi, asista profesoro de la kolegio. Post la inaŭguro, okazis la unua leciono de la kurso, kiu estos regule organizata ĉiusabate ĝis sia konkludo. Kursfine la studentoj ricevos oficialan atestilon de la kolegio. El la 50 partoprenantoj, preskaŭ ĉiuj estas malpli ol 25-jaraj, Unuafoje, oficiala Esperanto-kurso estas organizita en kolegio.

Prezidanto, Bharat Kumar Ghimire, Nepala Esperanto-Asocio

Ĉinio festas pri Montevideo

En la 8-a de decembro 2024 ni, Liaoning-a Esperanto-Kultura Klubo (LEKK), Ĉinio, festos la 70-an datrevenon de la Revolucio (**SMG**: reZolucio!) de Unesko pri Esperanto (Montevideo, en decembro 1954) kaj la 165-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro Zamenhof. Ni konsultis plurajn personojn, precipe NE-esperantistojn el la diversaj rondoj, je la fokuso kiel festi la du datrevenojn. Ni estis iom lacaj, sed ni ĝojas, ĉar ni havas komunan konscion, ke kunsido estas la plej bona maniero festi la du datrevenojn. ni plue kontaktos lokajn oficistojn el la eduka rondo. Ni ricevis la librojn donacitajn de s-ro Hori Jasuo el Japanio. Tio riĉigos la enhavon de niaj festoj.

Wu Guojiang, Prezidanto de (LEKK, Ĉinio. Retadreso: ghemelurboj@sina.cn ghemelurboj1@sina.com

Ondo honorigas movadan bastionon

Antaŭ 85 jaroj, la 2-an de decembro 1939, naskiĝis **Humphrey Tonkin**, Honora Prezidanto de UEA. La listo de Esperantaj jubileo kaj memordatoj por decembro, estas legebla :<https://sezonoj.ru/2024/12/decembro-12/>

Akademia konferenco – inda je pripenso

La 16-an kaj la 17-an de decembro 2024 okazos **Konferenco de la Akademio de Esperanto** kun naŭ prelegoj. Oni povos spekti ĝin per Zoom. Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2024/12/akademio-24/>

Honore al nia diligenta kolegaro

Okaze de la Tago de la Esperanta libro, dum la tuta decembro 2024 la libroservo de UEA ofertas la enciklopedion *Nia diligenta kolegaro*, kunverkitan de Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov, kun sesona rabato sendepende de la mendata kvanto. Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2024/12/ndk-12/>.

Almanako el Brazilo

La 15-an de decembro 2025 Eldonejo F. V. Lorenz kompletigos sian 50-an jaraĝon. Por festi tion, ni ekpreparas jubilean Almanakon, kaj ni intencas aperigi sur ĝiaj paĝoj gratulmesaĝojn el la plej diversaj landoj. Se vi volos partopreni de tiel grava momento, sendu vian mesaĝon al: editora_lorenz@uol.com.br


Celso Pinheiro, Eldonejo Lorenz

Esperantismaj pingloj

Mi produktis ĉi tiun esperantistaĝon en bona kvalito. La antaŭan mi perdis pro la maltaŭga fiksilo. Ĉi tiu fiksilo estas pli bona.

Mi vendas ilin kontraŭ malalta prezo: po 2,90 €. Tiu estas la prezo, kiun mi pagis, do mi ne enspezas ion. Ne estas komerca afero. Mi nur volas kompensi mian investon Ĉu vi volas flageton tian? Kiom da?

Aldoniĝos nur la sendokostoj. Do, plej bone vi mendu kelkajn, por ke la sendokostoj havu sencon. Estus bona donaco por viaj amikoj kaj samideanoj.



Frank Lappe

Hispana lingva edukado

La elektoj estas 99,9% por la angla, 74,2% por la hispana (kreskas), 18,5% or la germana (malkreskas). 6,5% por la itala kaj aliaj lingvoj malpli. Lernejoj devas lerni minimume du lingvojn kaj eblas studi trian sed malmulte da lernejoj studas tri lingvojn, do la sumo estas nur iomete pli ol 200%. Teorie por la du unuaj lingvoj eblas elekti inter 23 lingvoj. Por la tria lingvo aldoniĝas 25 aliaj, do entute inter 48 por la tria. En praktiko la elekto dependas de la disponeblaj lingvo-instruistoj.

La angla estas kvazaŭ deviga. Tiuj, kiuj ne elektis la anglan kiel unuan lingvon, devas lerni ĝin kiel duan. La hispana disponeblas en preskaŭ ĉiuj lernejoj. La aliaj pli kaj pli fariĝas 'raraj lingvoj'. Antaŭ pli ol 50 jaroj por la unua lingvo eblis elekti inter la angla (80% da elektoj) kaj la germana (20%). La hispana venis nur poste. Aliaj lingvoj ol tiuj el la listo 23+25 lerneblas nur kiel nedeviga fako laŭ loka bonvolo, ekz. Esperanto estis instruata en tri lernejoj. Plurlingveco malsanas.

Brazila Lingva Diverseco

Ĉiu el vi ricevis en via kongresa sako libro-markilon omaĝe al la internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj de Unesko (2022-2032). Ĉiu markilo portas la nomon de malsama brazila indiĝena lingvo. Estis faritaj 211 libro-markiloj kaj, sekve, ĉiuj el ili

estas unikaj. Tio celas montri al vi la lingvan diversecon de Brazilo kaj la kulturan riĉecon de nia popolo. Se ni ne scias, ke io ekzistas, ni ne vidas kialon por zorgi pri tio. Sed kiam io fariĝas videbla, tio fariĝas grava por ni. Pro tio ni invitas ĉiujn esperantistojn serĉi pri la indiĝena lingvo, kiu troviĝas en la libro-markilo kiu estas ene de la kongresa sako. Ni volas munti mozaikon de brazilaj indiĝenaj lingvoj.

Pluendis Duncan Charters

Kaŭna festo

Novembre en la Universitato Vytautas La Granda en Kaŭno okazis memorgespero dediĉita al la 165-a naskiĝdatreveno de Zamenhof, organizita de Kaŭna Juda Komunumo kunlabore kun Litova Esperanto-Asocio. La 200-persona salono estis plene. Legu pli en *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2024/11/litovio-78/>

Forta VoKo

La programero de la Virtuala Kongreso prizorgita de EEU, EDE kaj KomEŭA sukcesis! Bonvolu spekti la jenon ĉe Jutubo:

<https://youtu.be/upnwlXfWunY?si=zagoM3HFncUuZQkC>

La sekretario de EEU, d-ro **Luigi Fraccaroli** retroŝto: luigi.fraccaroli@esperanto.it

Artikoloj en facila Esperanto

<https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/aru%C5%9Do-gastigis-memorindan-universalan-kongreson-r444/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/%C4%9Denerale/internacia-tago-de-paco-r446/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/tra-la-reto/nova-kanalo-%E2%80%9Ckoninda%C4%B5o%E2%80%9D-r451/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/%C4%9Denerale/esperanto-kurso-por-hispan-lingvanoj-r448/>

Infan-rakontetoj el Brazilo

Jen rakontetoj por infanoj. Bonaj por instrui E-on al ili...

<https://youtu.be/-o3Tv3Hk7wY?si>

<https://www.youtube.com/watch?v=aBFIMZmQXps>

<https://www.youtube.com/watch?v=GqIMaFhHiUw>



Liette Lêla

Germana novjaro

Alvokas la 21-a Novjara Renkontiĝo, ekde la 27-a de decembro, en la junulargastejo de Wiesbaden ĝis la 3-a de januaro 2025. Aliĝis ĝis nun 129 homoj el 14 landoj; la duono venas el eksterlando. Venos laŭ la nuna stato 22 infanoj kaj junuloj Multaj prelegoj, gimnastiko, manlaboro, ekskursoj ...

- **Scienco kaj kulturo:** Prelegoj pri drakoj (kun fotoj), pri la biokemio de enamiĝo, amo kaj amoro, diskuto pri seksneŭtralaj esprimoj, krei kaj kolekti personajn Esperanto-lecionojn, pri bona digestado kaj bona sano.
- **Ludoj kaj aktivajtoj:** Cirklodancoj, Zumbo, Ĉigongo, manlaboro, origamio, sorobano, tablotenis, kanti la himnon (prefere parkere).
- **Por infanoj kaj familioj:** Pupteatraĵoj, Interkona vespero kaj interŝanĝo de kunportitaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Koncerto de Kaŝi, Silvestra Festo, Adiaŭa Vespero, Mirkvizo k.a.

- Ekskursoj, ekzemple al varma kaj malvarma naĝejoj kaj aliaj interesaj lokoj.
- Esperanto-kursoj kaj konversacio

Lego-rekomendo de ILEI

Por la ĉi-jara Zamenhofa Tago kaj Tago de la Esperanta Libro, ILEI proponas komune legi la komencon de la teatraĵo *1910* de Ĵenja Amis. Legu la intervjuon kun la aŭtorino por Ĉina Radio Internacia. En ĝi estas la ligilo por elŝuti la tekston, kunligo por spekti filmon de la teatraĵo kaj konsiloj por mem ludi ĝin en via Klubo.

Alessandra Madella

Montevideo en la memoro

La 70-a datreveno de la rezolucio de Montevideo estas bona okazo por rememori la historion kaj la signifon de tiu dokumento, kiu reprezentas la komunan celon kaj idealon fare de Unesko kaj Esperanto: konstrui pacon en la mondo per kulturo, edukado kaj scienco. Tion ni festas la 10-an de decembro 2024 en Montevideo en la Parlamenta Palaco, kie okazis la Ĝenerala Asembleo en 1954

renato corsetti, eŭropa komisiono de uea

Scienca kalendaro revenas

Aperis en Esperanto la kalendaro de la Supera Konsilio pri Scienca Esplorado de Hispanio. La Konsilio konfirmis ke aperos la kalendaro en 2025, kaj estos publikigata en PDF ankaŭ en Esperanto. Hispania skipo laboras super la tradukado, sed ni bezonas nehispanlingvan reviziadon. Volontuloj bv kontakti min.

José Antonio del Barrio, <http://www.delbarrio.eu>

Kurso en la pola el Krakovo

Okazas varbado al la nova retkurso A1-A2 por poloj aŭ parolantoj de la pola lingvo, La kurso estas malferma al plenkreskuloj de ĉiu aĝo. Por aliĝi, oni bv. kontakti min. Rigardu: [Foto: informilo pri kursoj de Jag. Univ. - libromarkilo](#)

Maria Majerczak

===== vortoj: 1150 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikaĵoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikaĵo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Komunikaĵoj ĝis 40 legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill@gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikaĵojn pere de retlisto.